



KATALUNA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO

DE LA

KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO
KAJ DE LA INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ

JARABONO:

Eksterlande: 4 pesetoj
Enlande: 3 pesetoj

ADRESO:

València, 245-BARCELONA

PER L'ENFORTIMENT DEL NOSTRE MOVIMENT

Fa totjust un any que dèiem des d'aquest mateix lloc, que ens calia l'ajut de molts esperantistes, que disseminats per algunes poblacions de Catalunya, dormitaven en el seu entusiasme, ja sigui per manca d'escalf o per ostracisme.

Cal que els samideans alludits prenguin exemple dels companys del Vendrell que, malgrat ésser ja antics adeptes de la nostra causa, han saccejat els seus muscles adormits i s'han posat a treballar per l'Esperanto amb tanta empenta, que podem dir ja des d'ara, mercès a llur entusiasme, que els pròxims Jocs Florals Internacionals i Congrés Català d'Esperanto tindran un èxit resonant. Així ho pogueren constatar els membres del Consell Directiu de la Federació Esperantista Catalana, que el dia 22 de gener d'enguany, acompanyats de la Professora Elinjo Pähn, es traslladaren al Vendrell per tal de lligar alguns extrems sobre la celebració dels actes més amunt esmentats.

Actualment funcionen al Vendrell tres cursos d'Esperanto i d'altres estant en preparació per a abans de la data de la celebració del nostre Congrés, que tindrà lloc els dies 4, 5 i 6 del pròxim mes de juny (segona Pasqua).

Invitem des d'aquí i des ara a tos els esperantistes catalans a preparar-se per a assistir en gran nombre al XVI^e. Congrés Català d'Esperanto.

XVI-A. KATALUNA ESPERANTO-KONGRESO

En la venonta numero de "Kataluna Esperantisto" ni donos detalajn sciigojn kaj informojn pri nia Kongreso en Vendrell. En tiu ĉi numero vi trovos kvarpaĝan aldonon kun kelkaj interesaj vidindaĵoj pri nia kongresloko.

La Kongreso kaj la Floraj Ludoj okazos dum la 4. 5. kaj 6-a de proksima monato Julio (Pentekosto). La programo ne estas ankoraŭ plene fiksita, sed ni povas jam antaŭanonci, ke kelkaj festoj estos organizataj je l' honoro de la kongresanoj. La lastan tagon de la Kongreso, t. e. la 6-an, oni ekskursos al la pentrinda monaĥejo "Santes Creus". Ni povas supraĵe kalkuli, ke la kosto de la tuta restado en nia Kongreso (hotelo, oficiala festeno, ekskurso k. c.) ne kostos pli ol 40 pesetoj.

XV-AJ. INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ

Pro manko de loko ni ne povas enpresi la liston de ricevitaj premioj por nia literatura festo. Tiu, kiu interesiĝas pri ili, bonvolu vidi nian antaŭn numeron aŭ peti rekte al ni informojn, enmetante unu respondkuponon. Ĉi-sube ni publikigas novan premion, kiu lastmomente alvenis al ni.

XXI. Premio de "Espero Katolika". Dujara abono al la revuo. Temo: Laŭvola, sed religia.

Ĝis nun ni ricevis 900 pesetojn kaj 10 nemonajn premiojn por ĉiuj premioj. Aliaj premioj estas ankoraŭ en preparo.

Verkoj ricevitaj por la XV-AJ. INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ.

1. Austriakus. 2. Traduttore, tradittore, 3. Pax Avant. 4. Sobeya. 5. Per Esperanto al Mondpaco. 6. Revo. 7. Se vi disfendus la ĉielon kaj malsuprenirus. 8. Tempo difinita estas por ĉiu afero sub la suno.

La Sekretario: Jaume GRAU CASAS.

INAUGURO DE ĈE-METODAJ KURSOJ EN BARCELONA

Dum la 17., 18. kaj 19-a de Januaro okazis ĉe *Acadèmia Cots* kaj *Llibreria Catalònia* tri provlecionoj, kiujn atente aŭskultis multnombra publiko kaj mirinde gvidis nia lerta Ĉe-instruistino fraŭlino Elinjo Pähn el Estonujo.

Nun du kursoj funkcias ĉiutage ĉe *Acadèmia Cots*, de la kvina ĝis naŭa vespere. Aliaj kursoj okazos en kelkaj katalunaj urboj per tiu ĉi interesa kaj efika metodo. Ankaŭ pro manko de spaco ni devas rezigni, ĝis la venonta numero, detalan raporton pri la altiraj provlecionoj, sukcesaj kursoj, efika instrusistemo, kaj pri la lerta kaj vigla profesorino Pähn.

RAPORTO PRI LA XIV-AJ INTERNACIAJ
FLORAJ LUDOJ

Okazintaj en Vinaroç la 9. Septembro 1928, dum la XVa Kongreso de "Kataluna Esperantista Federacio".

Tiu dek-kvara festo de niaj Floraj Ludoj — festo de Poezio — renkontis multnombrajn barojn. Ĝi ne disvolviĝis pace kiel la antaŭaj dek-tri festoj, sed male sur ĝi pezis la tragedio.

La ĉefa organizanto de la XVa Kongreso de K. E. F., en Vinaroç, estis S-ro Sebastià Chaler, el Terrassa, filo de Vinaroç, sed li ne povis ĉeesti la kongreson ĉar unu tagon antaŭ ĝi mortis lia filineto. Siatempe ni kondolencis, sed ni volas ripeti al amiko Chaler nian simpatian kaj nian tutkoran dankon.

La Sekretario de la XIVaj I. F. L. estis S-ro Joan Gili Norta, sed tuj post reveno de la Antwerpena universala kongreso li grave malsaniĝis kaj restis kvin monatojn en lito. Li ne povis trastudi la ricevitajn verkojn kaj komisiis tiun taskon al S-ro S. Alberich-Jofrè, kiu ankaŭ ne povis ĉeesti la kongreson, pro malsano. S-ro Alberich-Jofrè finverkis, en febra stato, la raporton kiun ni presigas hodiaŭ, kaj tuj devis enlitiĝi. Ambaŭ amikoj nun estas ree sanaj.

S-ro Jaume Grau Casas, nuna direktoro de "Kataluna Esperantisto", eks-prezidanto kaj eks-sekretario de la Floraj Ludoj, ankaŭ ne povis veturi al Vinaroç ĉar la 9. Aŭgusto 1928 mortis lia duonpatrino, la 15. Aŭgusto grave malsaniĝis lia patro, kaj kelkajn tagojn poste li mem suferis atakon de preskaŭ-holera epidemieto, okazinta en Barcelono pro la terura varmo, kiu regis dum tiuj tagoj.

S-ro Delfí Dalmau, prezidanto de K. E. F., la 22. Aŭgusto 1928 devis forlasi sian prezidantan postenon pro kaŝaj denuncoj kontraŭ li faritaj al la Provincestro, kaj pro tio, ke li ricevis ordonon fermi sian profesian laborejon: Liceu Dalmau. Li jam estis ricevinta, la 1. Junio 1928, ordonon de la Barcelona provincestro, Generalo Milans del Bosch, Ĝenerala Sekretariejo (komunikaĵo n-ro 4094), ke la "Kataluna Esperantista Federacio" ne plu sin nomu kataluna kaj aliĝu al la Hispana Esperanto-Asocio.

Post ĉio-ĉi, oni komprenos ke la Kataluna Kongreso kaj

la Floraj Ludoj en 1928 ne estis tre brilaj. Sed oni ne komprenos — ni mem ne komprenas — ke kelkaj *semideanoj* kuraĝis starigi fuŝan katalunan federacion kaj publikigi kelkajn numerojn de fuŝa "Kataluna Esperantisto". Tiujn numerojn ni konsideras *ekster* la kolekto de nia kara gazeto.

Feliĉe, post la sepjara diktatoreco de Primo de Rivera, ni povis, en kunveno 9. Aŭgusto 1930, redoni al nia federacio la helan nomon "Kataluna" kaj restarigi la aŭtentikan "Kataluna Esperantisto".

Ni ne raportas pri la Kongreso en Vinaroĉ kaj pri la postaj okazintaĵoj, ĉar ni ne volas naŭzi niajn legantojn kaj ĉar ja ni povus diri, kiel Hamleto: Io certe putriĝis en Danujo, sed ni sentas la devon skribi, eĉ kun prokrasto, ion pri la XIVaj Internaciaj Floraj Ludoj, por ke en la kolekto de "Kataluna Esperantisto" ne manku la raporto pri la sinsekvaj dek-kvar festoj, kaj por ke la tutmonda samideanaro sciu, ke ni ne laciĝas en la tasko *florludi*.

SEKRETARIA PAROLADO

Sinjorinoj kaj sinjoroj!

Antaŭ ĉio mi devas senkulpigi la sekretarion de la XIV Internaciaj Floraj Ludoj, S-ron Joan Gili Norta, kiu pro malsano, en la lasta momento, kontraŭvole devis transdoni al mi la protokolon por la sekretaria raporto. Mi sincere bedaŭras, ke vi ne povas aŭdi la veran sekretarion, pro tio ke lia raporto estus pli konscia kaj plena ol la mia. Oni senkulpigu min se iafoje, pro la rapido, kiu regis mian taskon, mi ne ĝuste opinios pri iu verko.

Longa estas la vojo, kiu antaŭ la esperantistoj etendiĝas. Ni iras konstante antaŭen, sed la celon kovras nebulo ankoraŭ, kaj ĝin ne ekvidas niaj okuloj. Kiom longe ni devos elteni? Ĉu neniam la homoj konscios kiom valora estas la ideo de Dr. Zamenhof? La vojo estas longa kaj plena de dornoj. Sub la masko "samideano" sin kaŝas malbonaj paŝtistoj, sub la devizo "homaranismo" oni fosas sub niaj piedoj, oni volas pereigi nin kiel esperantistojn kaj kiel homojn. Torquemada ne mortis. Sur la vojo li sin kaŝas kiel vipero, ŝteliras post ni kaj pikas la kalkanojn. Li ne montras sin en libera aero, kun alta frunto, rigardante en la okulojn. Li preferas kaŝe mordeti. Malgraŭ ĉiuj baroj ni sukcesis atingi nian XV Kongreson kaj la XIV Florajn Ludojn, kiujn ni ĵus komencis.

Niaj Floraj Ludoj ne estas io nova en Esperantujo. Niaj literaturaj konkursoj disvastiĝis tra la tuta mondo kaj hodiaŭ ili

estas unu el la plej belaj festoj de nia movado. La famo de niaj Floraj Ludoj altiris diversfoje eksterlandajn samideanojn, kiuj persone volis ĝui la feston. Kiam oni vizitas eksterlandajn rondojn esperantistajn, oni konstante demandas nin pri la Festo. Pro tio ni povas konstati, ke la plimulto de la verkoj venas de eksterlandaj esperantistoj, kiuj ĉiujare kun pli granda fervoro partoprenas la konkurson, dum la enlanda partopreno ne progresas, kontraŭe, malkreskas.

Rigardante nian nacian movadon de malproksime, ŝajnas ke en Katalunujo oni povas renkonti esperantiston ĉe ĉiu paŝo. Tiel granda kaj impona estas nia Festo! Tamen, se ni analizas la situacion de nia enlanda movado, ni konstatas ke ĝi ne respondas al la famo, kiun ĝi ĝuas.

Parte pruvas tion la fakto ke niajn konkursojn partoprenas tre malmultaj enlandaj samideanoj. Ĉe ĉiu festo, iu temo speciale elektita por katalunoj ne estas konkursita. Ne estas nun la momento adekvata studi kaj esplori la kaŭzojn de tio. Ni simple rimarkigas la kontraston inter la ŝajno kaj la realo.

El la historio ni scias, ke multaj popoloj sukcesis travivi la plej teruran jugon dank'al la poezio. La poezio kantis la iaman liberecon, ĝi konstante prezentis al la popolo la dolĉajn glorojn de la mortinta patrujo. Ĝi rememorigadis la pasintan tempon, la martirojn de la sankta batalo. Ĉu por Esperanto, Poezio ne ludas similan rolon? Ĉu ni ne havas en ĝi la plej belajn paĝojn de nia literaturo? Se ni rigardas la esprimoplenajn strofojn de la versoj de la majstro, ni trovas en ili novan forton por daŭrigi la batalon. Ili parolas al ni pri la turmentoj de la kreinto de Esperanto, ili kantas al ni la belan estonton kaj donas al ni kuraĝon por la plua eltenado. Post la majstro kreiĝis tra la tuta mondo la internacia poezio, kiu havas la plej veran manifestacion en nia Festo. La poetoj sonorigis la lirojn antaŭ la amatino, kaj la dolĉaj sonoj estis egale belaj en ĉiuj landoj. Amo kaj Poezio pasie kuniĝis. Amo sen poezio ne estas vera amo. Poezio sen amo ne estas amo.

Pro tio kiam ni anoncas novajn Florajn Ludojn, la liro de ĉiu esperantisto-poeto aŭdigas sian ĝojon, sian esperon aŭ sian disreviĝon. Al niaj konkursoj venas la kanto de ĉiu sopiranto al la altaro de Amo. Al nia Festo sopiras la koro de ĉiu amanto.

Gloron al vi, gardantoj de la ardanta koro. Nia Festo estas la malfermiĝo de la floro, ĝi estas la kiso al nova tagiĝo, la kiso de la geamantoj.

Sinjinorinoj, Sinjinoroj: Kun granda ĝojo mi devas anonci, ke la Naturan Floron de la XIV Internaciaj Floraj Ludoj oni aljuĝis al F-ino Varma Järvenpää el Vammala (Finlandia). Sin reprezentas Sro. Delfi Dalmau.

Kun tremanta voĉo mi diskonigas, ke F-ino *María de la Victoria Pérez de Sanmillán* estis elektita Reĝino de la Festo. Kun respekto kaj amo ni akceptu la nunjaran Reĝinon.

Sub tondra aplaŭdo kaj vivukrioj envenas en la salonon nia bela Reĝino kun la ne malpli belaj Korteganinoj. Kun ĉarma rideto ili dankas sian popolon kaj akompanataj de la aŭtoritatuloj kaj esperantistoj ili sidiĝas sur la altrangaj seĝoj sur la strado.

Fariĝas silento kaj la sekretario daŭrigas: —Reĝina Moŝto, Reĝina Kortego! Mi volus esti poeto por dece akcepti vin kaj kanti antaŭ vi mirige kaj bele la senton de mia koro.

Mi volus esti lerta reganto de la lingvo por laŭdi milmaniere vian belecon kaj tiun de viaj korteganinoj. Sed plej bone mi povas akcepti vian regadon kun la jena saluto de via hodiaŭa edzo:

SALUTO AL LA FESTO

Ho, kiel grandan montras Vi honoron
al mi, modesta, simpla nordanino:
Akcepti rajtas mi *naturan floron*
kaj ĝin prezenti al la Festreĝino!
Sufiĉe belajn vortojn mi ne trovas
por danki pro l' feliĉo enviata,
koregan dankon mi nur diri povas
al Florolud-Estraro estimata.

Se Vian feston povus mi ĉeesti,
al mi ĝi estus honorego, ĝojo!
Sed hejme devas mi humile resti,
ĉar tro longega estas ja la vojo.

Sed en spirito trovos mi rimedon
ĉeesti feston de la poezio,
en pensoj doni belan florbukedon—
Ho, grandioze estas ankaŭ tio!—

Gratulas mi Reĝinon de l' vespero
kaj ŝian regnon el sincera koro:
Subuloj ŝiaj ĝuu plej sincere!
Ŝi regu en feliĉo, ĝojo, gloro!

Mi sentas min malgranda kaj humila,
feliĉa kaj dankema, kore ĝoja!
Por Vi pro la honoresprimo brila
eksonu vivukrio centmilfoja!

Varma JARVENPAA.

Kaj nun, Ekscelencaj aŭtoritatuloj, gesinjoroj. Se la XIV Floraj Ludoj ne superis laŭ nombro kelkajn antaŭajn Ludojn, ili superis ĉiujn laŭ kvalito. Ili pruvis al ni, kian grandan paŝon faris Esperanto. Ni povis konstati, ke nia lingvo atingis altan maturan gradon kaj ke multaj homoj regas ĝin mirige kaj bele. Ni

spertis, ke malgraŭ ĉiuj ventegoj unueco regas en nia lingvo. Se la Poezio havas en nia hodiaŭa festo kelkajn glorajn paĝojn, ne malpli gloraj kaj laŭdindaj estas tiuj, kiuj reprezentas la Prozon. La Juĝantaro aljuĝis la sekvantajn premiojn:

Ordinara versaĵo kantanta amon

Peza kaj longa estis la laboro de la Juĝantaro por juste aljuĝi la plej altan premion. Diversaj versaĵoj meritis la altan honoron kaj nur post serioza pensado kaj detala esploro oni elektis por la premio la verkon 42 kun devizo "Homa sorto". La versoj dolĉe fluas, ili havas agrablan ritmon kaj rimarkindan rimon. La aŭtoro pruvas apartan lertecon en la versfarado. La senco estas interesa kaj sugesta. Kiel mi anoncis la aŭtoro estas F-ino Varma Järvenpää (Finlândia).—

Sro. Delfi Dalmau legas la premiitan verkon. La aŭdantaro atente aŭskultas kaj aplaŭdas kun granda entuziasmo.

MI SERĈIS VIN, HO MIA FRATANIMO

Vi kie estas, mia fratanimo?
 Mi jaron post la jaro vin serĉadis,
 Renkonti vin mi arde sopiradis,
 Sed vane vagis mi ĝis monda limo:
 Mi vin ne trovis... Ĉu mi trovos iam?
 Aŭ ĉu neniam?

Ĉu estas vi en riĉaj sudolandoj,
 Ĉe palmoj altaj, florokampoj ĉarmaj?
 Jen brilas sunradioj fajrovarmaj
 Kaj sablo preskaŭ brulas sub la plandoj:
 Loĝejo via ĉu lokiĝas tie?
 Aŭ ĉu nenie?

Vi eble estas reĝo sudolanda,
 Portanta sceptron kaj juvelan kronon,
 Estranta potencegan regionon,
 En kiu trovas sin popolo granda?
 Vin oni servas kaj vin oni ŝatas,
 Plej oni flatas...

Favoro via plej serĉata estas,
 Vi vivas en feliĉo, luksobriilo;
 Por via gloro, ĝojo kaj utilo
 Popoloj oferdonas, agas, festas.
 Ĉu plenakore vi la vivon ĝuas?
 Ĉu ne enuas?

Ho jes, — mi scias, — dum la flato, gloro
 Soifon fortan vi konstante sentas,
 Eterna sopirego vin turmentas,
 — Vi frostotremas sub la silko, oro —
 Kaj inter miloj vi tutsole sidas,
 Neniun fidas...

Aŭ ĉu infano estas vi mizera
 De l' nordaj montoj, dikaj marglacioj?
 Ne vin atingas varmaj sunradioj,
 Ne floraromoj, ĉarmo sudsomera!
 Ĉirkaŭas ĉiam vin nur frostoj, vento
 Kaj noktsilento.

Nur vastajn neĝokampojn vi rigardas,
 Pro frostoj preskaŭ sango glaciigatas;
 Interno via tamen nur varmiĝas,
 En ĝi sopiro de l' feliĉo ardas...
 Ne estingiĝas la animesperoj
 Eĉ ĉe l' neĝeroj.

Vi kie estas, fratanimo, kie?
 Ĉu ne kunvenos ni dum vivvojaĝo?
 Ĉu l' atendado estas plenkonsento?...
 Verŝajne vin akiros mi nenie.
 Kaj tamen estas mi sen vi malriĉa
 Kaj malfeliĉa...


Ho, eble vi jam antaŭ jarcento
 Naskiĝis, vivis, agis kaj suferis,
 Atendis, sopiregis kaj esperis
 Kaj jam ripozas en la mortsilento...;
 Sur tombo, kiu vian polvon kaŝas,
 Mi eble paŝas...

Aŭ eble vi ankoraŭ ne ekzistas,
 Nek eĉ la patro, nek patrino via?
 Soleca restas vivovojo mia...
 Mi sensignife en serĉad' persistas;
 Vin eble nur vivigos stranga sorto
 Post mia morto. —

Mi serĉis vin en brilo de l' okulo
 Kaj forta ĉirkaŭpreno de l' amato,
 En lia voĉo, spiro, korobato —


XVI-A KATALUNA ESPERANTO-KONGRESO
XV-AJ INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ

VENDRELL, 4-5-6 JUNIO DE 1933




Parto de nia bela kongresloko

KOMENCU, DO, SPARI MONON KAJ ĈEESTU NIAN
KONGRESON!!!



Vendrell



Popolbiblioteko (Kongresejo)




Portalo de l'«Pardo»



Strato Pau Casals

KOLONJO

La urbo de la 25-a Universala Esperanto-Kongreso



La fama Katedralo, Rejnrivero kaj kajo

(Vidu artikolon pri Kolonjo kaj sciigojn
pri la Kongreso sur p. 13, 14, 15 kaj 16)

Al mi por ĉiam restis li fremdulo...
 Ĉe lia brusto sentis mi solecon,
 Malintimecon. —

Vi kie estas, fratanimo mia?
 Vi certe ie vagas maltrankvile
 Kaj sopiregon portas vi simile —
 Ĉu povas esti amordono Dia,
 Ke ni kuniĝos dum la viv' neniam,
 Nur serĉas ĉiam?

Varma JARVENPAA

—Al la sama verko oni aljuĝis la premion eksterordinaran de la Urbestro de Vinaroç.

Al la verko 41 kun devizo "Savinien", pro la beleco kaj bela formo, oni aljuĝis la duan premion, tiun de Sro. Narcís Bofill. La aŭtoro estas Ĉuvi Lovostan el Budapest (Hongria), kiun reprezentas Sro. Conrad Domènech.

La trian premion la Juĝantaro aljuĝis al la konkursaĵo 46 kun devizo "Cindrulino". La premion donacis Sro. S. Alberich Jofrè. La gajninto estas F-ino Antonia Riv el Szentes (Hongria).

La premion de Sindicato de Policia Rural atingis la verko 51 "Saluton al la vivo" de Ivan Lubjanovski el Voroneĵ (Rússia). Reprezentanto Sro. Antoni Vergés.

Kvina premio, tiu de Banco de Castellón, estis aljuĝita al la verko 23 kun devizo "Koro", kies aŭtoro estas Sro. Jakobo Schmid el Berno (Suïssa).

Sesan premion, tiun de Pósito Marítimo Terrestre, atingis la verko 20 kun devizo "Excelsior", kies aŭtoro estas F-ino Amalia Núñez el Navarra (Espanya). Ŝin reprezentas F-ino Montserrat Solà.

Mencion meritas la verkoj 44 "Varmaj manoj" kaj 13 "Ĝojo, malĝojo de la vivnutraĵo", kies aŭtoroj estas Kolos Imban el Szentes (Hongria) kaj Francesco Pizzi el Venezia (Itàlia).

Proza ama verkaĵo

Neniu verko konkursis por tiu ĉi temo.

Tradukitaj tekstoj

Esperantigo de la kataluna versaĵo "Vora el barranc dels Algodins". Du verkojn ni ricevis por tiu ĉi temo. Kvankam la lingvo estas korekta, la traduko ne aljustiĝas al la teksto originala nek konservas ĝian formon. La Juĝantaro opiniis ilin menciindaj. Ili estas la verkoj 5 kaj 6 kun devizoj "Amo, amo, amo" kaj "Lumo".

La aŭtoro de ambaŭ tradukaĵoj estas nia kara amiko Sro. Narcís Bofill el Palma de Mallorca.

Esperantigo de la kataluna prozaĵo "El punt de dolçor", de Carles Riba. Kun bedaŭro ni konstatis, ke neniu verko estis ricevita por tiu ĉi temo. Ni devas bedaŭri, ke neniu kataluna esperantisto kuraĝis traduki tiel facilan prozaĵon.

EKSTERORDINARAJ TEMOJ

Originalaj prozaĵoj

Granda nombro da verkoj estis ricevita. Malfacila tasko estis elekti la plej bonajn ĉar multaj verkoj, la plimulto, estis korekte kaj elegante verkitaj. La prozistoj ja superis tiun ĉi jaron la poetojn. Ili pruvis ĝis kia grado de fleksebleco estas uzebla Esperanto. Kelkaj rakontoj havas interesan kaj allogan enhavon kaj estos tre bedaŭrinde, se oni ne povos ilin publikigi. Nia samideanaro havus grandan ĝuon legante tiel modelajn rakontojn.

La premioj estis aljuĝitaj laŭ la jena ordo;

Premio de la Grupo "Lumon!" el Terrassa al la verko 32 "Anatemo" kies aŭtoro estas Sro. Jakobo Schmid el Bern (Suisa).

Premio de Grupo "Barcelona Stelo" al la verko 77 kun devizo "Ne tentes aut perfice". Ĝia aŭtoro estas nia bone konata amikino S-ino Emma Osmond el London (Anglaterra). Ŝin reprezentas F-ino Angela Escursell.

Premio de Grupo Nova Sento el Barcelona al la verko 55, devizo "Oni ekkonas birdon laŭ flugo", kies aŭtoro estas la granda stilisto Sro. Ivan Ŝirjaev el Baklanka (Rússia).

Premio de Sdad. de Carreteros al la verko 56, devizo "Ne en unu tago elkreskis Kartago". Premio de Banco de Tortosa al la verko 54, devizo "Verkado ne estas tiel facila". La aŭtoro de ambaŭ verkoj estas sro. Ivan Ŝirjaev el Baklanka (Rússia), kiu novafoje montras sian talenton kaj vivoplenan stilon.

La premio de Societades Albañiles y Carpinteros estis aljuĝita al la verko 59 kun devizo "Tamen" kies aŭtoro estas Sro. Teo Jung el Horrem (Alemania).

Oni aljuĝis la premion de Societades de Peones y Barberos al la verko 2 kun devizo "Malnova ideo en nova originala vesto". La verkinto estas Sro. Karl Minor el Hamburg (Alemania). "

La premion de Ateneu Mercantil meritis la konkursaĵo 68, devizita "Cigo". Ĝia aŭtoro estas Sro. W. Gardner el Sheffield (Anglaterra).

La premion de Sro. Teo Jung oni aljuĝis al la verko 75 kun devizo "La granda demando". La aŭtoro estas Sro. Karl Field el Graz (Austria).

La sekvantaj verkoj meritis mencion.

Nro. 64, "Ŝanavan Og", aŭtoro S-ino Emma Osmond el Londono. Nro. 66, "Al saĝulo sufiĉas aludo", verkita de la ĵus citita samideanino. Nro. 25, "Edukado", aŭtoro Maria Schöttl el Reutle (Austria). Nro. 30, devizita "Viktimo", kies aŭtoro estas Theodor Kilian el Kounice (Txecoslovàquia).

Ordinaraj versaĵoj

El la diversaj verkoj ricevitaj por tiu ĉi grupo reliefigas tiu kun nro. 79 sub devizo "Ni estu ĉiuj gefratoj". Ĝi estas rakonto en formo de poemo pri la legendo Ribecal, la demono, kiu en praa tempo loĝis en Rizenmontaro, inter Silezio kaj Bohemujo. La poemo enhavas 138 kvarversajn strofojn kun rimo ĉe la dua kaj kvara versoj. Al ĝi oni aljuĝis la premion de Pastro Joan Font Giralt. La aŭtoro estas F-ino Hilde Scholze el Reichenberg (Alemania).

La premion de U. A. B. O. atingis la konkursaĵo 40, devizo "D. E." Aŭtoro Ĉuvi Lovostan el Budapest (Hongria).

Trian premion atingis la verko 63 kun devizo "Manjo". Al ĝi oni destinis la premion de Paco kaj Amo el Barcelona. La aŭtoro estas F-ino Martha Vervloet el Antwerpen (Belgica).

La premion de Coop. Obrera La Económica gajnis la konkursaĵo 49 kun devizo "Antonia". La verkinto estas Kolos Imban el Szentcs (Hongria).

La premion de Pósito Marítimo atingis la konkursaĵo 37, devizita "Kion koro sentas, lango prezentas". Ni ŝuldas ĝin al la plumo de S-ino. Catharina Roskes el Hago (Holanda).

Lastan premion, tiun de Peña Femina, gajnis la verko 50, devizita "Abundo apud abismo". Ĝia aŭtoro estas Sro. H. Windisch el Oramenburg (Alemania).

Tradukitaj prozaĵoj

Tre rimarkindajn verkojn ni ricevis por tiu ĉi grupo. Kvankam la premioj estas abundaj, kelkaj verkoj ne premiitaj meritis premion.

La premioj estas disdonitaj laŭ la jena ordo.

Premio de Dro. Marian Solà al la verko 57 kun devizo "Se kion mi ne scias, mi sciis, ĉiuj min envidus". La aŭtoro estas Sro. Ivan Ŝirjaev el Baklanka (Rússia).

Premio de Esperantista Klubo Palma al la verko 86, devizita "Amo ĉion toleras". Ĝin verkis Sro. Karl Czeck el Seifen (Txecoslovàquia).

La premion de Banco de Castellón oni aljuĝis al la konkursaĵo 78 kun devizo "La pluvelfino". Ni ŝuldas ĝin al la plumo de Dro. W. Bichler el Graz (Austria).

La premion de Banco de Tortosa atingis la verko 71, devizita "El la historio". La traduko apartenas al Dro. D. Chenem el Bar-

celona. Ĝi estas bona traduko de la oka ĉapitro de la konata kataluna verko *La Lliçó de la Història*.

La premion de Círculo Católico Obrero meritis la tradukaĵo 70 kun devizo "Amo prudenta". La aŭtoro estas Dr. Adolf Halbedl el Graz (Austria).

Tradukitaj versaĵoj

Kun ĝojo ni rimarkis ke la konkursaĵoj por tiu ĉi grupo havas ne ordinaran korektecon. Sed kun malĝojo ni konstatis ke neniu enlanda samideano partoprenis.

Premio de Sro. Delfí Dalmau al la verko 67 kun devizo "Verona". La aŭtoro estas F-ino Louise Briggs el Armley (Anglaterra).

La premion de Sro. Joan Gili Norta atingis la versaĵo kun devizo "Ĉiu laŭ sia povo", nro. 62. Ĝin tradukis F-ino Martha Vervloet el Antwerpen (Belgica).

La verko 61 kun moto "Orfeo" meritis la premion de Sro. Sebastia Chaler. Aŭtoro H. Bermuyten el Antwerpen (Belgica).

Premio de Cruz Roja. Ĝi estis donita al la konkursaĵo 3, kun devizo "Per nur dek-du linietoj", traduko de Karl Minor el Hamburg (Alemania).

Meritis la donacon de Centro Instructivo Republicano la verko 33 kun devizo "Coventry", kies aŭtoro estas F-ino Louise Briggs el Armley (Anglaterra).

Laŭpove mi donis al vi raporton pri la hodiaŭ festataj Floraj Ludoj. Mi bedaŭras, ke mi ne povis pli bone komentarii ĉiun premiitan verkon. Por tio oni bezonas longan tempon kaj apartan studon de ĉiu konkursaĵo. Tio ne estis ebla. Mi ne povis dediĉi al la raporto kelkajn horojn kaj sen tio oni ne povas detale raporti. Pardonu min, ke la malsano de la efektiva sekretario, nia kara Gili, altrudis al vi mallertan raportanton.

Mi estus malĝentila, se mi ne esprimus la kutimajn dankovortojn al tiuj, kiuj iel partoprenis en la sukcesigo de la Festo. Al la Juĝantaro, precipe al la eksterlandaj kunlaborintoj, al la partoprenintoj, al vi, kiuj aŭskultis pacience mian fuŝan raporton kaj al vi, ho kara Reĝino, kiu kun viaj ĉarmaj korteganinoj donis al nia festo la plej belan trajton. Antaŭ vi mi humile kliniĝas kaj kun plektitaj manoj preĝas por ke eterne vi regu niajn Florajn Ludojn.

S. ALBERICH - JOFRÈ

Fine la Prezidanto de la Floraj Ludoj, Pastro Joan Font Giralt, faris belan paroladon, kiu inde kronis la poezian feston.

EL KATALUNUJO AL KOLONJO

En Barcelono mi vidis grandiozan monumenton konstruatan. Kiam ĝi estos finkonstruita, ĝi estos eble la plej grandioza katedralo de l' kristanaro en la mondo. Kvar turoj, kolosaj laŭ dimensioj sed graciaj laŭ aspekto, jam staris pretaj unu apud la alia. La die inspirita artisto, projektinta la katedralon, antaŭvidis tri tiajn turokvarojn. Kaj la tutan turaron kronu unu ĉefa turego, 170 metrojn alta, superstaronta la dekdu ceterajn. La nomo de tiu ĉi giganta monumento estas "Sagrada Familia" (preĝejo de la "Sankta Familio"), kaj la nomo de la genia artisto ĝin elpensinta estas Gaudi. Ĝis nun oni konstruis je ĝi jam pli ol kvin jardekojn, ĝia genia elpensinto jam ne vivas. Kiam ĝi estos finkonstruita?

En Kolonjo ĉe la Rejno levigās alia grandioza monumento de l' kristanaro. Ĝi posedas nur du turojn, ambaŭ altajn je ĉ. 160 metroj. Sed ĝi estas finkonstruita. Pli ol ses jarcentojn post sia ekkonstruiĝo ĝi estis finkonstruita. En 1248 konstruisto Gerharo elpensis ĝian planon, kaj laŭ la modelo de l' katedralo de Amiens en Francujo ekestis la belega gotika ĥorejo. Ĝi estis preta post 74 jaroj. Manko de mono kaŭzis, ke la laboroj je la katedralo poste kontinuis nur malrapide, kaj en 1560 ili tute ĉesis, kaj la belega verko komencita minacis ruiniĝi. Nur en la komenco de la pasinta jarcento, post 150-jara halto, rekomenciĝis la laboroj por ripari kaj konservi la konstruitaĵon. Tamen ĝi restis torso, ĝis kiam, en 1842, la prusa reĝo Frederiko Vilhelmo IV-a metis la fundamentan ŝtonon por la daŭrigo de l' konstruado, kaj fine, en 1880, la Kolonja katedralo, la plej fama gotika templo de l' kristanaro, estis preta por inaŭgurado.

Kiam la laboroj je la "Sagrada Familia" nuntempe progresas nur malrapide, Katalunoj do ne ĉagreniĝu pro tio, sed konsoliĝu per la sorto de la Kolonja katedralo. Dum jarcentoj ŝajnis, ke la mirinda verko de Majstro Gerharo neniam estos finita; sed fine tamen venis la horo de ĝia plenumiĝo. Ni volas esperi, ke ankaŭ por la grandioza verko de Gaudi iam batos la horo de ĝia finkonstruo.

Certe multaj Katalunoj deziras en la venonta somero viziti Kolonjon por rigardi kaj admiri la jam pretan katedralon de Majstro Gerharo,—kiam en tiu fama urbo apud la Rejno okazos la 25-a *Universala Kongreso de Esperanto*.

Sed la katedralo estas ne la sola vidindaĵo, kiun prezentas la dumiljara metropolo de Okcidenta Germanujo. Multaj preĝejoj, riĉenhavaj muzeoj, bonaj teatroj, universitato, kvar feraj pontegoj trans la Rejnon, mezepokaj pordegokasteloj, imponaj monumentoj, grandaj magazenoj, ampleksaj foirhaloj kun plej moderne instalita kongrespalaco, — kurbaj stratetoj, larĝaj bulvaroj, vastaj parkoj

kaj ĝardenoj, granda stadiono, aviadejo, — multaj ĉarmaj ekskurslokoj ĉe la romantika Rejno kaj en ĝiaj flankaj valoj, montoj kaj rokoj kronitaj de kasteloj kaj ruinoj, vinberujoj, arbaroj, interesaj urboj, pitoreskaj urbetoj, idiliaj vilaĝoj, — gajanimaj homoj, vino, kantoj kaj bonhumoro, — ĉi ĉio troviĝas en Kolonjo kaj ĉe la Rejno, kaj kiu vizitos tiun ĉi benatan pecon da tero, tiu certe ne enuos.

Ĉu pluajn detalojn pri Kolonjo vi deziras? Jen tute mallonge:

Fondis ĝin Romana generalo en la jaro 38 a. Kr. En 50 p. Kr. ĝi ricevis la nomon "*Colonia Claudia Ara Agrippinensis*" kaj urbajn privilegiojn. Dum la mezepoko Kolonjo estis unu el la plej fortaj kaj brilaj urboj en la mondo, precipe fama komerca kaj "Hansa" urbo. Nuntempe ĝi havas 740.000 loĝantojn, estas la ĉefa fervoja kruciĝejo en Okcidenta Germanujo, havas gravan komercon kaj gravan industrion, 25 bankojn, 40 konsulejojn kaj grandan fremdultrafikon. En la jaro 1930 vizitis ĝin 558.000 fremduloj, inter ili 130.000 eksterlandanoj.

La sorton de la urbo nuntempe direktas ĝia ĉefurbestro D-ro Konrad Adenauer, vasthorizonta kaj energia viro, kiu invitis ankaŭ la 25-an Esperanto-Kongreson; unu el la urbestroj de Kolonjo, s-ro Bönner, estas prezidanto de la Loka Kongresa Komitato. Sekve de ilia influo, la urba trafikoficejo ĉiel subtenas la kongrespreparojn, disponigis 20.000 aliĝilojn, naŭ filmojn kun Esperantoteksto kaj 3.000 belajn grandformatajn afiŝojn, grandan nombron de kliŝoj, tekstojn por artikoloj ktp. Laŭ ĉi ĉio, kaj la jam alvenintaj multnombraj aliĝoj (interalie ankaŭ el Katalunujo) oni povas supozi, ke la Jubilea Kongreso en Kolonjo fariĝos unu el la plej brilaj kaj plej bone vizitataj kongresoj, kiujn la esperantistaro povis festi ĝis tiam.

Eble ankoraŭ unu fakto speciale interesos la katalunajn amikojn. Fame konataj estas la katalunaj Florludoj. Nu, antaŭ la milito ankaŭ en Kolonjo ofte okazis tiaj Floraj Ludoj, ĉiujare je la 1-a de Majo, eĉ kun brilaj ceremonioj en la pompa festsalonego "Gürzenich". Ili estis enkondukitaj tien de Kolonja Hofrat Fastenrath, kiu longtempe vivis en Katalunujo, multe ŝatis la Florajn Ludojn kaj decidis transplanti ilin al la Rejno, en kio li bone sukcesis. Kaj memoru, ankaŭ, ke unu el la plej konataj Kolonjaj samideanoj, s-ro Teo Jung, la eldonanto de la semajna gazeto "Heroldo de Esperanto", gajnis la Naturan Floron okaze de la Internaciaj Floraj Ludoj en Santa Coloma, en la jaro 1926, per sia "Alta Kanto de la Amo", ke li venis por persone saluti sian ĉerman florreĝinon, kaj ke li estis kore akceptata en Katalunujo kaj en tuta Hispanujo.

Do, jam ekzistas, per la poezio, bonegaj rilatoj inter Katalunujo kaj Kolonjo. Unu plia kaŭzo por katalunaj gesamideanoj, aliĝi multnombre al la Jubilea Kongreso kaj kunfesti kun la gajaj sed celkonsciaj Rejnlandanoj en Kolonjo la Arĝentan Mond-

feston de Esperanto! Kvankam en Kolonjo vi ne trovos la "Sagrada Familia'n", sed tamen vi trovos tie la katedralon super la relikvoj de la Sanktaj Tri Reĝoj, — en Kolonjo vi trovos ne la bluan Mediteraneon, sed la verdan Rejnon, — kaj proksime de la kongresurbo vi trovos ne "Montserrat'on", sed "Sepmontaron" kun "Draka Roko" kaj "Angulo de Rolando"; — sed krom tio vi trovos, mi povas certigi al vi, en Kolonjo amikajn gesamideanojn kaj plej koran akcepton.

M.

25-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

Koln, 29. Julio-5. Aŭgusto 1933

OFICIALAJ SCIIGOJ

Oficiala Invito: La Jubilea Kongreso okazos en Kôln (Kolonjo apud Rejno) laŭ oficiala invito de la ĉefurbestro de Köln, D-ro Konrad Adenauer, Prezidanto de la Prusa Ŝtata Konsilantaro.

La Kongresurbo sin prezentas: Köln estas preskaŭ dumiljara urbo, fondita de la Romanoj en la jaro 38 a. Kr. kaj ricevinta urbajn privilegiojn en la jaro 50 p. Kr. ("Colonia Claudia Ara Agrippinensis"). Ĝi situas en la koro de Eŭropo inter Berlino, Parizo, Londono kaj Svislando-Italujo, apud la riverego Rejno (germ.: Rhein).

Mondfama pro sia gotika katedralo, sia parfum-industrio (Kolonja Akvo="Eau de Cologne") kaj multaj antikvaj kaj novtempaj vidindaĵoj (preĝejoj, pordegokasteloj, universitato, muzeoj, teatroj, stadiano, parkoj, zoologia ĝardeno), kvar feraj pontoj trans la Rejnon. Haveno, stacidomoj, aviadejo. Vigla komerco kaj trafiko. 740.000 loĝantoj. La Kolonjanoj estas precipe konataj pro sia sangvina temperamento kaj bonhumoro en bonaj kaj malbonaj tempoj.

La Kongresa Palaco de la urbo Köln estas unu el la plej modernaj domegoj tiucele konstruitaj kaj situas en bela parko apud la Rejno. Ĝi estos je nia dispono dum la 25-a Universala Kongreso.

La Loka Kongresa Komitato formiĝis kaj kore salutas la tutmondan esperantistaron.

Prezidanto: urbestro Bönner; Vic-prezidanto: urba lerneja konsilisto Theile; Afergvidantino kaj kasistino: s-ino M. Gernsbacher; Sekretario: Wilhelm Wingen; Fakestro por loĝado kaj amuzoj: Fritz Kurth.

La adreso de la LKK estas: 25-a Universala Kongreso de Esperanto, Trajanstr. 25, Köln, Germanlando.

La poŝta ĉekkonto funkcias sub la numero: Köln 52 kaj sub la titolo: 25-a Universala Kongreso de Esperanto, Köln.

Bankkonto: Dresdener Bank, Depositenkasse Chlodwigplatz, Köln, Germanujo.

Kotizoj: Por faciligi al la samideanoj la aliĝon al la kongreso kaj kun la celo plejeble fruigi la aliĝon kaj simpligi la preparlaboron, la LKK decidis, interkonsente kun la ICK, akcepti ĉiujn aliĝojn ĝis inkluzive 31, 3. 1933. je favorkotizo de nur gmk. 18.—. Post 1. 4. 1933 validos la plena norm-kotizo de gmk. 20.—.

Junulaj Membroj: La ordinara kotizo por gejunuloj malpli ol 17-jaraj estas gmk. 5.—Gejunuloj ne rajtos ricevi la kongresajn dokumentojn.

Blinduloj kaj ties gvidantoj ricevos kongreskarton senpage.

Helpkongresanoj: Tiuj, kiuj ne povas ĉeesti la kongreson, povas tamen aliĝi kiel helpkongresanoj po gmk. 10.—.

Donacoj por la kongresa kaso estas plezure akceptataj. Ĝis nun la kongresa kaso ricevis donace gmk. 96.48.

Informpetoj de LKK: La informpetantoj bonvolu aldoni necesan afrankon por la respondo, per respond-kupono aŭ UEA-kupono. Ĉiam indiku sur ĉiu letero aŭ karto vian plenan adreson! La jam aliĝintaj samideanoj bonvolu meti sur ĉiun skribaĵon la numeron de sia kongreskarto.

Aliĝoj: Ĝis nun anoncis sian aliĝon 325 personoj el 25 landoj.

Por kiel eble plej multaj baldaŭaj aliĝoj tre dankema estos la

Loka Kongresa Komitato.

AL NEKREDEMULOJ

Iuj samideanoj ne povas kredi, ke la Asocio de Esperantistaj Libro-Amikoj vere donos por la kotizo pagata tiom da libroj. Ili opinias la prezojn neeblaj, preskaŭ nekredeblaj. Tamen, la entrepreno estas fakto, la nomo de Literatura Mondo, kiu estis nia plej agema eldonejo dum la lastaj du jaroj, kalkulis certe bone kaj efektivigos senmanke la planon. Vi nur devas sendi vian aliĝilon kiel eble plej rapide, ĉar povos okazi, ke iu libro estos rapide elĉerpita kaj vi devos elekti anstataŭ ĝi iun alian. Ne forgesu ankaŭ tion, ke la favora kotizo nur por tiuj validas, kiuj sendas sian aliĝon kaj almenaŭ unuan parton de sia kotizo ankoraŭ antaŭ 1-a de februaro. Antaŭ forsendo de la aliĝilo trastudu la prospekton denove tre atente. Ne forgesu aldoni al la sumo la necesan monon por sendkostoj kaj pripensu, ĉu ne uzi binditan serion, ĉar la bindo estas tre malmultekosta. Ankaŭ memoru vian bonan amikon, kiu volonte aĉetus librojn, sed ne havas multe da mono. Eble lin ne trafis prospekto kaj tial informu lin pri AELA. Ja povas okazi ankaŭ tio, ke vi ne plu trovas vian prospekton. En tiu okazo petu novan al Literatura Mondo (AELA) Hungarujo, Budapest IX. Mester-u. 53.

Bone notu la datojn kaj faru ĉion antaŭ la 1-a de februaro.